

N. N. 07,

## La pensoj de la hom'

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

La pensoj de la hom'

liberas kaj restas,

laŭ nokta fantom'

kaŝite ja estas.

Ĝin hom' nek divenas

nek ĉenoj katenas.

Do restas laŭ senc',

ke liberas la pens'!

Mi pensas kun plezur',

kverelojn evitas.

Sekrete mi nur

pri ĉio meditas.

Dezirojn- vi sciu,

malhelpas neniu,

ĝi restas laŭ senc',

ke liberas la pens'!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

...

Se iu ĵetos min  
karceren ĉepane,  
mi simple diras lin:  
“Vi agas ja vane.  
La pensoj trapasos  
kaj murojn frakasos  
per forta potenc’,  
ĉar liberas la pens’.”

Kaj tial ĉe la fin’  
mi zorgojn forŝovu,  
ke vivgoĵo min  
do daŭre plu movu.  
Mi povas sentime  
beati anime  
laŭ sento kaj mens’,  
ĉar liberas la pens’!

*Traduko de la Germana poemo “Die Gedanken sind frei” de N. N. 07 en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-286-582 (2010-09-19 18:46:36)*

*Germana popolkanto. Vortoj de “fluganta folio” (1780)*